

Ekologia Rezolucio de OKSEJT-29

"Ni, partoprenantoj de la 29a Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (1988.08.18/28), reprezentantoj de 43 urboj el 8 respublikoj de USSR, konsciante minacan ekologian situacion sur la planedo kaj potencialan rolon de tiaj internaciaj komunikiloj kia estas lingvo Esperanto en plibonigo de la situacio, alvokas ĉiujn esperantistojn subteni ekologiajn movadojn, proponante kaj helpante al ili uzi en la internaciaj kontaktoj Esperanton labor- kaj pont-lingve. "

pri la Amikeca Reto

La Amikeca Reto estas socivojaĝa servo starigita de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Ĝia funkcio estas tute simpla: Vojaĝantoj, aĉetinte ĝian adresaron, vizitas personojn kiuj atendas ilin. Aliflanke, la akceptantoj proponas la viziton de siaj vivejoj; tio povas estas la prezento de siaj domoj, laborejo aŭ aliaj sociaj lokoj. La unua retlisto enhavis 112 akceptantojn, kune kun detaloj pri socie interesaj vidindaĵoj kaj pri temoj kiujn tiuj homoj aparte ŝatas diskuti. Se vi volas partopreni tiun bonvolan servon, skribu al AVEano Gérard Rollin: 63 rue de la République, Chargé, F-37530 AMBOISE.

Kiel aliĝi al AVE

Unue, certigu ke vi ja havas la samajn celojn kiel AVE: kunligado de esperantistoj kiujn interesas la politika movado bazita sur ekologiaj principoj; uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel komunikilo de tiu movado; peranta agado inter tiu movado kaj la Esperanto-Movado.

Tiam, se vi volas ke nia asocio estu ankaŭ via asocio, informu la sekretarion (vidu p.1), prefere kun detaloj pri viaj apartaj interesoj verdaj; pensu pri jarkotizo (15 gld) pagota post ricevo de numero 6 ! (Apartaj kondiĉoj por malriĉuloj.)

[Presita sur 100% recikla papero]



# AVENO n° 5

kvaronjara bulteno de la  
ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANTISTAJ

Sekretario: Jean-Claude Thumerelle  
Rue Pierre de Simpel 10, 7790 Warneton, Belgio

Redaktoro de "Aveno": Christopher Fettes  
St Columba's College, Dublin 16, Irlando Resp.

Januaro-Februaro-Marto 1989

Jes, jen por vi granda surprizo! La lasta numero de nia bulteno aperis en Decembro 1986, do verŝajne multaj de niaj membroj estis supozantaj ke AVENO mortis: sed ne; kiel volkano ĝi nur kvietumis, kaj nun denove la lafo verda ekfluas. Sed ĉu daŭre kaj poste torente? Nu kompreneble, kiel antaŭe, tio dependos de vi, la legantoj; sed mi havas la impreson ke nun estas multe pli da esperantistaj verduloj ol kiam AVE fondiĝis, eble iom "antaŭ sia horo" kiel dirus Victor Hugo (ĉu praavo de la verdisma movado?).

Mi do kun konvinko povas anonci ke AVENO ek de nun ja aperos laŭregule, ĉar mi havas fidon ke vi, la AVEanoj, ne plu hezitos sendi novaĵojn pri la verda movado en via lando kaj eĉ artikolojn. (Meze de tiu ĉi numero vi trovos modelan eseon pri la historio de verdismo en Finnlando.)

Sed ne forgesu pri kia bulteno temas. Ni volas aperigi informojn ne pri ekologio tutsimpla (kiu tamen kompreneble tre gravas) sed pri ekologia politiko. Ni volas ligi la laboron de verduloj en diversaj landoj kaj montri al verduloj kiuj ankoraŭ ne subtenas Esperanton ke ĝi ja estas ideala ilo por la verda movado internacia. C.F.

Limdato por Aveno 6: 1989 03 01

# Warum

## ist Esperanto die Sprache für die Grünen?

- weil die Sprache Esperanto speziell geschaffen wurde, um Frieden durch internationale Verständigung zu erreichen;
- weil durch Esperanto die Vielfalt der regionalen Sprachen bestehen bleibt und diese vor der Übermacht der imperialistischen Sprachen schützt;
- weil wir Grünen bei unseren internationalen Zusammenkünften Sprachdiskriminierung nur vermeiden können, wenn wir untereinander die neutrale Sprache Esperanto gebrauchen.

Für weitere Auskunft:

**Deutscher Esperanto-Bund,**  
Lambertstraße 12,  
D-35041 Bad Hersfeld

Herausgegeben von:  
Veren der Grünen Esperantisten  
St. Columba's College, Dublin 16, Irändische Republik.

# Waarom

## is Esperanto dé taal voor de groenen?

- omdat Esperanto een taal is, speciaal ontworpen om vrede te bereiken door internationaal begrip;
- omdat Esperanto de verscheidenheid van regionale talen beschermt tegen het overbodig gebruik van imperialistische talen;
- omdat enkel door het gebruik van de neutrale taal, Esperanto, wij, Groenen, de taaldiscriminatie binnen onze eigen internationale bijeenkomsten kunnen tegengaan.

Voor meer inlichtingen contacteer:

**Vlaamse Esperanto-Bond,**  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, België

**Nederlands Esperanto-Instituut,**  
Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

Uitgegeven door:  
Vereniging van Groene Esperantisten.  
St. Columba's College, Dublin 16, Ierland

## Allaj landaj asocioj en okcidenta Eŭropo:

Dana Esperanto-Asocio  
Skellet 12  
DK-6000 Kolding, Danmark

Esperanto-Asocio de Finnlando  
pl. 48  
SF-00131 Helsinki 13

Helena Esperanto-Asocio  
Agiu Meletu 54  
GR 112 52 Athina, Greklando

Hispana Esperanto-Federacio  
Carreras Candi 34-36  
E-08028 Barcelona

Esperanto-Asocio de Irlando  
9 Tempieogue Wood,  
Tempieogue, Dublin 12

Islanda Esperanto-Asocio  
Posthólf 1081  
IS-101 Reykjavik

Itala Esperanto-Federacio  
Via Villorosi 38  
I-20143 Milano

Luksemburga Esperanto-Asocio  
1, rue de Kehlen  
L-8394 Olm

Norvega Esperantista Ligo  
Olaf Schous vei 18  
N-0572 Oslo 5

Portugala Esperanto-Asocio  
Rua Dr. João Couto 6, r/c A  
P-1500 Lisboa

Sveda Esperanto-Federacio  
Brunnsgatan 21  
S-111 38 Stockholm

Svisa Esperanto-Societo  
Zumhofstr. 22  
CH-6010 Kriens LU

Turka Esperantista Asocio  
p.k. 54  
Üsküdar/Istanbul

La Esperanto-movado estas aparte forta en ĉiuj landoj de orienta Eŭropo, escepte Albanio.

## PRI LA KUNORDIGO DE EŬROPAJ VERDULOJ

Dum la unua semajfino de Oktobro okazis kuraĝiga kunveno de la Kunordigo. Kiam ĝi komenciĝis la membraro konsistis en dek unu partioj el dek landoj. Kiam ĝi finiĝis, ni estis dek kvin partioj el dek kvar landoj.

Aŭstrio jam estis dum sufiĉe longa tempo observado. La delegitoj disdonis mallongan, utilan historion de Die Grüne Alternative, kiu rakontas kiel apartaj grupoj kunlaboris, kiel ili decidis komunan programon, kiel kunagado kontraŭ la propono konstrui barajon en la rivero Danubo instigis sukcesplenan politikan kunlaboron. Tia konstruaĵo nun minacis la riveron en Hungario; Sara Parkin raportis pri sia vizito al Hungario por partopreni, kiel Eŭropa Verdulo, la debaton. Ĉiu bonvenigis Aŭstrion kiel anon de la Kunordigo.

En Hispanio, problemo ŝajnis; du partioj volis membriĝi, kaj ili tute ne konsentis kunlabori. Sed eventuale unu ne ĉeestis, kaj la alia, Los Verdes, kiu nun havas grupojn en ĉiu regiono, krom Vasukujo, membriĝis.

Malsama problemo en Portugalio: du partioj volis membriĝi; ili volonte kunlaboras, sed ili ne volas kunfandiĝi. Unu el ili, Movimento Demokratiko Portuguesa, antaŭe estis socialisma partio; la alia, Os Verdes, foje enestis la saman 'liston' kiel la komunista partio.

Per Gahrton, kunsekretario kun Sara Parkin de la Kunordigo kaj sveda parlamentano, diris: "La id-eala verda partio konsistiĝas je unuopuloj, ne alvenintaj el dekstra aŭ el maldekstra, kaj kiuj aliĝas al nek dekstra nek maldekstra; sed ni devas rigardi la realecon kaj akcepti ambaŭ." Aliaj klarigis ke la komunista partio en Portugalio jam ekzistas dum 60 jaroj kaj ke dum multaj jaroj ĝi strebis kontraŭ maljusta registaro. Fine, ambaŭ membriĝis.

Nun oni povas kalkuli ke, kvankam la unua verda

## RENKONTIĜO EN ANTVERPENO

Sekve al letero sendita al eŭropaj AVEanoj frue en 1988, dekumo da membroj ĉeestis la kongreson por la Eŭropaj Verduloj organizita de Agalev, kiu tre afable permesis nin senpage starigi budon, eĉ ekspozicion pri Esperanto kaj AVE.

Dank' al malavara donaco de karmemora Ruth Painter, unu el niaj plej fruaj membroj, ni povis eldoni 5-lingvan folion, bele presita de la apuda Grafika Centro. La naciaj lingvoj uzitaj estis la angla, la flandra, la franca kaj la germana, ĉar tiuj estis la oficialaj lingvoj de la kongreso. La mallonga teksto aperis ankaŭ en Esperanto; jen ĝi:

Kial Esperanto estas la lingvo por la verduloj?

- ĉar Esperanto estas lingvo planita por disvastigi pacon pere de internacia kompreno;

- ĉar Esperanto protektas la diversecon de regionaj lingvoj kontraŭ la tro-uzado de imperialismaj lingvoj;

- ĉar nur per la uzado de la neŭtrala lingvo Esperanto ni, Verduloj, povas elimini diskriminacion dum niaj propraj kunvenoj internaciaj.

Unu flanko de tiu varbfolio troviĝas, duongrande, sur la kontraŭa paĝo. Por la pariza kongreso (vidu p.3) ni tamen ŝatus aperigi pli ambician, pli multlingvan folion. SED NI BEZONAS VIAN HELPON ! Nia agado estus multe pli efika se ni povus havi almenaŭ unu membron el ĉiunacia partio kiu respondecus pri AVEaj aferoj en sia lando kaj konsentus al la apero de siaj nomo kaj adreso sur la varbfolio. Se vi povus ankaŭ ĉeesti la kongreson en Parizo, eĉ pli bone, sed tio ne estas nepra afero.

Alia afero: por la antverpena kongreso mi persvadis amikon desegni butonon kun la vortoj "La Verduloj en Antverpeno 1988". Ĉu ni havas artistan membron kiu povas prepari taŭgan desegnon por la kongreso en Parizo? Se jes, skribu al la redaktoro. (Ronda desegno nepras.)

parlamentano estis elektita en 1979, en Svisujo, nun troveblas inter la anoj de la Eŭropaj Verduloj almenaŭ 80 parlamentanoj. la sveda partio, Miljöpartiet, nun havas 20 parlamentanojn.

Post diskutoj, la kunveno decidis ke la venonta Verda Kongreso okazos en Parizo, dum Aprilo. Les Verts jam trovis taŭgan lokon, kaj ili diras ke ili povos aranĝi ke la gazetaro raportu la aferon.

Maire Mullarney (Comhaontas Glas, Irlando)

+ + + + +

### VERDULOJ ESPERANTISTAJ : BONVENON EN PARIZO !

La Kunordigo (internacia fako) de la Verduloj decidis ke la venonta kongreso okazos en Parizo de la 21a ĝis la 23a de Aprilo, 1989.

La internacia fako konsistas el reprezentantoj el la jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando Resp., Luksemburgo, Nederlando, Portugalio, Svedio kaj Svislando. Ĝi do estos vere internacia kongreso, kaj certe tie troviĝos multaj problemoj lingvaj. Tial la multnombra ĉeesto de verduloj esperantistaj el ĉiuj tiuj landoj estas tre grava por konigi Esperanton inter la ĉeestontoj idealismaj.

Ni do urĝas vin: (1) petu pliajn informojn de la Verda Grupo en via lando; (2) informu nian sekretarion ke vi intencas iri al Parizo; (3) se vi estas membro de Pasporta Servo aŭ de SAT, skribu al samideanoj en la pariza regiono.

Se vi NE povos ĉeesti, tamen volas helpi, bonvolu skribi al la Redaktoro - kiu havas malgrandan taskon por vi !

\*\*\* NE FORGESU LA DATOJN : 1989 04 21-23 \*\*\*

Imitenda Ekzemplo

Post la katastrofo en Ĉernobil "Esperanto-Disvastiga Grupo" en Japanio kontaktis esperantistojn en diversaj landoj por scii kiamaniere oni raportis pri tiu evento en ilia lando.

De tiu kunlaboro naskiĝis interesa broŝuro 92-paĝa kun ilustraĵoj kies titolo estas "Ĉernobil skuis la mondon", kun la subtitolo: Leteroj de eŭropaj esperantistoj pri la atomcentrala akcidento en Sovetio.

Japanaj gazetoj kiel "Asahi ĵurnalo" raportis pri tiu internacia laboro esperantista. Jen bona ekzemplo de la utileco de Esperanto en ekologiaj medioj! Ĉu tio donos ideojn al niaj membroj?

(La broŝuro estas havebla, kontraŭ 400 enoj, de Kinugaŝa Hiroŝi, Niŝirokugo 4-6-24-219, Oota-ku, Tokio 144, Japanio.)

Radikala Antinukle-Energia Movado

De la 2a ĝis la 5a de februaro okazos internacia kongreso de RAEM. Broŝuro en diversaj lingvoj estas jam haveblaj. La kongreso uzos maksimume kvar laborlingvojn.

Se vi intencas partopreni tiun renkonton, skribu - sciigante kiujn lingvojn vi regas - al LAKA, Stephensonstraat 15, NL-67107 EDE. Aŭ vi povus kontakti AVEanon Ronald Nobel', Postbus 6625, NL-6503 NIJMEGEN.

MONATO

Ni gratulu la redaktoron de Monato, Stefan Maul, ke li tiel ofte aperigas, en sia altvalora magazino, artikolojn pri ekologio.

Ni menciuj ankaŭ ke la granda anonco kiu aperis sur la dorsa kovrilo de iu numero, sub la nomo de AVE, ne estis oficiala deklaro de nia Asocio sed pensiga esejo de nia membro d-ro W.Gunther.

Kelkaj koncizaj novaĵoj

SVEDIO la 18an de septembro la verdula partio, "Miljöpartiet de Grona" enparlamentigis. Estas nun du dek ekologiistoj en la sveda parlamento.

FRANCIO La 25an de septembro kaj la 2an de oktobro okazis voĉdonado por elekti reprezentantojn en la asembleoj de la departementoj (administraj distriktoj). Francio enhavas 100 departementojn. La ekologiistaj kandidatoj ĉeestis en 85% de la departementoj kaj ricevis mezvalore 6% de la voĉoj. Kvin kandidatoj ricevis pli ol 20% de la voĉoj dum la unua voĉdonado kaj tri povis ĉeestis dum la dua. (? Rezulto ?)

BELGIO La 9an de oktobro okazis voĉdonado por elekti la komunumajn konsilantarojn. Post tiuj balotoj oni konstatas ke la verdaj partioj progresis:

- Agalev (flandra verda partio) ricevis 7,2% de la voĉoj (tio estas 2% pli ol en 1982). La partio havas nun 142 reprezentantojn en la komunaj konsilioj. (30% el ili estas virinoj.)
- Ecolo (valona partio) progresas ankaŭ. Antaŭe ĝi havis 75 reprezentantojn sed nun havas 120.

ESTONIO Tiu lando kompreneble (ankoraŭ) ne rajtas havi verdan partion, sed ĝi ja havas verdan movadon, kiu lastatempe aliĝis al Teramikoj Internaciaj (FOEI) al kiu ankaŭ jam membriĝis la Pola Ekologia Klubo. Movadoj kreskas ankaŭ en aliaj orienteŭropaj landoj. Certe "glasnost" multe helpas ties progreson.

EŬROPA KOMUNUMO Tio kio estis EEK estas nun EK, kaj dum la somero estos balotoj en ĉiuj el la apartenantaj landoj por la tiel nomata Eŭropa Parlamento. Espereble ĉiuj niaj legantoj uzos la okazon por emfazi la urĝan bezonon de racia lingvo-sistemo en la parlamento. Kial ne skribu al la verdaj kandidatoj en via lando por taktplene demandi ilian sintenon pri Esperanto ?

pri eblecoj supervivi, timas socia frakcio.

Laŭ ekologistoj socia frakcio malgravigas danĝeron de detruo kaj planas sociajn utopiojn. Demokracio ne nepre savos la mondon.

Tamen ambaŭ frakcioj enhavas ankaŭ pensadon de alia frakcio. Oni planis ke verduloj povus esti kunlabora movado anstataŭ partio.

Ideologia diferencigo kaj venontaj parlamentaj elektoj aktualigis organizan problemon. En kunveno en Espoo dum 1986 oni decidis inviti la unuan organizigan kunvenon al Tampere. Gi estis aranĝita en junio 1986 kaj tiam partiigo de la movado komenciĝis.

Ideologia diskuto restis nefinita. Diskutado pri partio pli interesiĝis. Laborgrupo elektita en kunveno proponis tri diversajn modelojn: partio, asocio kaj reto.

Dum la somero de 1986 Pertti Linkola denove varmigis mensojn. Li verkis celprogramon por verduloj. En ĝi li proponis maksimume unu milionan loĝantaron (nun ĉ.5 milionoj), malkonstruigon de industrio, anstataŭigon de maŝinoj per fizika laboro, unu-partian sistemon kaj aŭtoritatan regadon. Publikeco muĝis, verduloj ŝokiĝis.

Linkola planis fondiĝon de verdula vivprotektista partio. Paloheimo verkis proponon por programo de "Verda movado (reg. partio)". Ankaŭ frakcio socia planis programon. Ville Komsu kolektis pli ol 100 subskribojn kontraŭ fondiĝo de partio.

Je 1986.09.27 okazis en Tampere organiza kunveno kun 400 partoprenantoj. Plej gravis partio aŭ ne. Kunveno decidis per 207 kontraŭ 88, ke partio ne estas fondita. Plimulto subtenis fondiĝon de tutlanda asocio, kies membroj estos ideologiaj societoj. Partio estis entombigita por tri jaroj, oni diris. Sed partio ne volis resti en tombo.

[daŭrigota en n-ro 6]

## LA VERDULA MOVADO EN FINNLANDO

Ĉi tiu artikolo de Pauli Välimäki aperis en VIHREÄ LANKA ('Verda Fadeno') en aprilo 1988. Opinioj kaj enhavo bazigis sur antaŭaj numeroj de VL kaj sur personaj spertoj de la verkisto (ĉefredaktoro de VL).

La Esperanta traduko estas iomete mallongigita kaj kelkaj (por eksterlandano) ne bezonataj nomoj estas forigita. La artikolon tradukis Jukka Pietiläinen. Dankon, Jukka !

1983: Ekesto

Komence verda movado estis proksima al diversaj alternativaj movadoj. En parlamentaj elektoj en 1983.3 "verduloj" uzis citilojn kaj esprimon socia eksperimento, kiam ili parolis pri si mem.

En Finnlando verduloj estis dekomence egale socia alternativa movado kaj ekologia movado. Kandidatoj kaj subtenantoj reprezentis i.a. mediprotektatan, virinan, pacan, evolulandan kaj handikapulan movadojn.

Verduloj kandidatiĝis en sep distriktoj (entute 15), plejparte ĉe universitataj urboj. Rezulto: 41000 voĉojn (1.4%) kaj parlamentanojn Ville Komsu el Uusimaa kaj Kalle Könkkölä el Helsinki. Gajno surprizigis politikistojn.

En majo oni kolektiĝis en Tampere kun ĉ. 400 partoprenantoj. Movado naskiĝis. La problema temo de la diskuto estis organizado de movado. Malmultaj parolis pri partio. Movado eblis havi taŭgajn formojn sen supra gvidado.

1984: Stabiliĝo

Komunumaj elektoj aŭtune 1984 signifis tutlandiĝon kaj ideologian multflankiĝon de la movado. Speciale tradiciaj mediprotektantoj aliĝis al la movado.

La movado kreskis de malsupre sen tegmenta organizo. "Reto" estis populara vorto. Oni aranĝis liberformajn kunvenojn, kolektis nomojn de kontaktpersonoj kaj fondis temajn laborgrupojn. Ankaŭ lokaj asocioj kaj grupoj fondiĝis.

En julio 1983 en "kontaktejo" de 'Verda Fadeno' estis adresoj de 20 lokaj grupoj. En komunumaj elektoj verduloj kandidatiĝis en 69 komunumoj (entute 445) en ĉiuj regionoj de la lando.

La movado estis kreskinta el eta alternativa movado de universitataj urboj al malgranda popol-movado. Neniu sciis kiaspecaj homoj estos novaj deputitoj de verduloj. En 50 komunumoj estis elektitaj 107 verduloj al loka deputitaro. Donis siajn voĉojn al verduloj 77000 civitanoj (2.9%).

Unufoje somere oni kolektiĝis (kaj ankoraŭ kolektiĝas) por tutlanda renkontiĝo. Publikeco volis partiajn kunvenojn. Verduloj volis renkontiĝojn kaj diskutojn. Decidojn kaj devigajn planojn oni ne faris. Tamen renkontiĝoj speguligis situacion de la movado kaj antaŭenigis ĝin.

En renkontiĝo en Oulu dum 1984 oni traktis tezojn de Erkki Pulliainen: oni ne superu tolerpovon de naturo, oni ne superu tolerpovon de homo, oni pripensu longtempajn konsekvencojn de la decidoj, oni ne lasu fakturojn pagotaj de la venontaj generacioj. Pli konkretan programon oni ne volis havi. Pli aktuala estis ke oni trovis "ĝustajn demandojn".

Naskiĝis re-uzado-movado, iniciativo pri futurologio, seminario "Finlando envenonteco", grupoj pri alternativa sociala politiko. Partioj ekverdiĝis konkurse. Verduloj influis pli multe ekster movado ol per kresko de propra agado.

Parlamenta grupo organizis tutlandan informadon kaj preskaŭ droniĝis en laboro. Verduloj estis en mal-tro organizita stato, karakterizis Osmo Soininvaara. Oni planis malgrandajn lokajn ofic-  
ejon kiel solvon.

1985: Kazo de Linkola

"Estas tre ĝojinde, ke en verduloj ne ekzistas opinio: Ni-Gustuloj-kaj-vi-ĉiuj-aliaj," skribis iu en 'Vihrea Lanka' (Verda Fadeno) en 1984.

Pertti Linkola estis la unua "Mi-ĝustulo" de la movado. Kunveno en Turku estis turnopunkto

en evoluo de la verduloj. Oni petis Turku-anojn fari proponon pri movada organizo. Anstataŭ tio estis farita propono pri programo. Ĝiaj ideoj pri socialigo kaj limigo de la loĝantaro atingis publikecon kaj unuajn artikolojn "Verduloj dis-  
iĝos".

Parolado de Linkola malkaŝis dividon inter "malhelpantoj de ekologia katastrofo" kaj "konstruantoj de la civitana socio".

Linkola akuzis verdulojn pri senefikeco. Li difinis verdulan movadon kiel strikte ekologian transvivadmovadon, kiu devas ekuzi militan disciplinon kaj laŭbezzone uzi perfortajn metodojn. Li volis limigi ekster la movadon tutan aron da alternativuloj kiel vegetaranojn, feministojn kaj handikapulojn, kiuj estis konata eco de ĝis-  
tiama verdeco.

El 250 partoprenantoj ĉirkaŭ 10 subtenis la tezojn de Linkola. Konceptoj kiel linkolaismo kaj ekofaŝismo aŭ pli modere ekologismo iĝis, pro vasta publikeco de tiu okazaĵo, dividigan econ de la verdula movado.

1986: Ideologiaj skismoj

Ekologia frakcio gvidis diskuton. Eero Paloheimo verkis "skizon por programo". Socia frakcio havis malfacilon orientiĝi pro programa verkado de ekologistoj. Problemo ne ĉiam estis ideologia, sed oni ne sentis, ke tradicia programo povus kolektigi verdulojn. Pli multe oni volis ĝisfundajn diskutojn ol partiajn manifestojn.

Diferencoj de frakcioj estis koncize jenaj: "malhelpantoj de ekologia katastrofo" havas biologian mondkoncepton kaj "konstruantoj de la civitana socio" havas sociologian mondkoncepton. Ambaŭ grupoj senta opiniojn de alia frakcio mankantaj kaj ne ĝisfunde pensitaj.

Troa ekologismo povas kaŭzi totalitarismon, ekologian diktaturon, kiun realigos tiuj, kiuj havas "ĝustan scion" pri bezonoj de biosfero kaj